

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.  
Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

N-o 152  
12. 8. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
Zanoni (literaturo)  
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)  
Esperanto Triumfonto  
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona-  
ta al ĉiu specimena kaj unua numero  
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

**Brazila Ligo Esperantista ricevis de la Internacia Ekspozicio de Rio de Janeiro oran medalon pro sia bonega elmontrito de Esperantaj.**

### X-a Bulgara Esperanto-Kongreso.

Ankaŭ la X-a kongreso de bulgara Esperantistoj havis grandan sukceson. Ĝi okazis la 12-15. julio en la malnova urbo Tirnovo. Ĉeestis 400 Esperantistoj el la tuta lando kaj 7 gastoj el Rumanio, inter ili la konata propagandisto Henriko Fiŝer, pastro Andreo Ĉe kaj senatano Ernesto Balaŝ.

La kongreso estis salutata de la reprezentanto de la Ministro de la Popola Instruado kaj de multaj kultursocietaj.

Laŭ la raporto de la Centra Komitato dum la jaro 1922/23 en Bulgario ekzistis 42 Esperanto-grupoj kun entute 1081 organizitaj Esperantistoj. Sed la vera nombro de la Esperantistoj en la lando estas multe pli granda. Nur de la eldonita de la Societo lernolibro dum la jaro estas venditaj 4000 ekz. kaj granda procento de la aĉetintoj certe jam scipovas kaj uzas Esperanton, tamen novajn membrojn la societo akiris malpli ol dekonon de tiu ĉi cifero.

Preskaŭ ĉiuj grupoj dum la jaro gvidis Esperanto-kursojn kaj en pli ol 40 gimnazioj Esperanto estis oficiale instruata. Bonajn sukcesojn alportis la „propaganda semajno“ dum kiu alportis la kelkaj grupoj faris grandan propagandon per publikaj paroladoj; estis malfermitaj multaj novaj kursoj, varbitaj membroj kaj abonantoj.

Ankaŭ la financa stato de la societo grave plibonigis kompare kun antaŭaj jaroj. La kaŭzo estas, ke la societo komencis la eldonadon de lernolibroj, kiuj facile kaj rapide disvendigas.

En la budĝeto por la venonta jaro la kongreso voĉdonis salajron por la sekretario. Oni decidis, ke la propaganda semajno, pro sia signifo por la propagando restu ankaŭ estonte kaj oni fiksis ĝian tempon — la unua semajno de novembro. Estis fiksitaj komuna festotago de la bulgaraj Esperantistoj — la unua dimanĉo de la propaganda semajno — kaj estis alprenita rezolucio, en kiu la XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg estas petata alpreni komunan festotagon por la tutmonda Esperantistaro, en kiu tago oni festos la „tagon de la mondlingvo“ kaj manifestos antaŭ la mondo la unuecon de la Esperantistoj.

Koncerne la invito de la XVI-a al Sofia oni konsentis, ke tio okazu nur post la konsento de la ŝtato doni la petitan subvencion.

Antaŭ la fermo de la kongreso, je la 15. julio antaŭtagmeze la rumana senatano s-o Ernesto Balaŝ parolis pri „La vojo de la paco“ solvante la demandon pri interpaciigo inter la diversaj popoloj kaj inter la klasoj en la landoj. Laŭ li nur la kooperigo povas atingi tiun celon, la kooperigo por ekspluato de la naturriĉaĵoj en la landoj kaj precipe de la akvofortoj por elektra energio. La referato estas tradukita bulgarlingven kaj faris bonan impreson al la publiko. Post la parolado s-o Balaŝ estas salutita de la societo de inĝenieroj en Tirnovo, kiuj montris al li la atingitan tiudirekte en Bulgarujo.

Post tiu parolado la kongreso estas fermita kun paroladoj de s-oj G. Aktiarĝev, At. D. Atanasov, kaj de Andreo Ĉe.

Dum la kongreso okazis fakunsidoj de komunistoj, vegeteranoj, Esperanto-lektoroj, instruistoj, profesiaj literaturistoj, tradukantoj kaj turistoj. La lastaj akceptis rezolucion prezentata al la kongreso de la Junulara Turista Ligo (29. julio). En tiu rezolucio estas postulata kunlaboro pli intima inter turistoj kaj Esperantistoj.

Okazis same Esperantista vesperfesto kaj koncerto de la orkestro de blindaj Esperantistoj kun bona sukceso.

Je la lasta tago la kongresanoj faris ekskurson ĝis proksima monaĥejo en pitoreska intermonto, trarigardis la vidindaĵojn de la antikva urbo kun siaj ruinoj de palacoj, preĝejoj kaj disiris ĝoje pro la grandaj sukcesoj atingitaj de la Esperanto-movado en Bulgarujo, kaj decidintaj ankoraŭ pli streĉi siajn fortojn dum la venonta jaro por la proksimigo de la sopirata celo.

Simeonov.

### Socia Vivo.

La efiko de la okhora labortago sur la konsumadon de alkoholo.

Kune kun la enketo pri la uzo de la libertempo de laboristoj, kiun la franca Ministerio de Laboro faras deponi 1919, oni klopodis por konstati, ĉu la malplimuligo de laborhoroj alkondukis la laboristojn pasigi pli da tempo en drinkejoj, kaj kaŭzis pligrandigon de drinkemo. Dum la diskutoj antaŭ la aprobo de la Leĝo de la 25-a de Aprilo 1919, pri la Okhora Labortago, iuj deputitoj esprimis la timon, ke tio povos okazi.

Samtempe la rezultatoj de la novaj reguloj pri la peraj efikoj de drinkemo sur industrio (foresto el laboro, precipe la tagojn sekvantajn feriojn, malreguleco, tumultoj en laborejoj ktp.) estas esploritaj ĉe iuj el la okupadoj, en kiuj tiuj efikoj plej sentiĝis antaŭe.

El la arestaĵoj kolektitaj en la daŭro de la enketo, ŝajnas ke rimarkebla malpliigo je la konsumado de alkoholo ĉe la laborista klaso estas okazinta.

La Ministerio de Laboro montris, ke, krom la faktaj konstataĵoj en la enketo pri la uzo de la libertempo de la laboristoj (elmigro al la cirkaŭurboj, disvolvigo de ĝardenoj por laboristoj, pligrandigita intereso pri sportoj, ĉeesto ĉe profesiaj kursoj kaj pli granda uzo de bibliotekoj), ekzistas aliaj kaŭzoj por tiu malpliigo. Inter tiuj kaŭzoj estas la granda plialtiĝo de la prezoj de alkoholaĵoj drinkaĵoj, la leĝoj faritaj dum la milito (malpermeso de la manufakturo kaj vendo de absinto, malpermeso de malfermo de novaj drinkejoj, impono de pli severaj punoj por drinkemo en publikaj lokoj, malpermeso de alkoholaĵoj drinkaĵoj en industriaj kaj komercaj establaĵoj), kaj la propagando farita de la instruistoj en la lernejoj, kaj de la mastroj kaj laboristaj organizaĵoj ĉe la laboristoj.

La artikolo en Social Informoj (la ĉi-semajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo) kiu enhavas la antaŭajn sciigojn, donas ankaŭ la detalajn konkludojn rezultantajn de la enketo en la Paris'a distrikto. Estas notinde, ekzemple, ke en la konstruindustrio kaj ĉe publikaj laboroj oni konstatis, ke alkoholkonsumo kaj drinkemo multe malpliigis dum la lastaj jaroj. La praktiko foresti el laboro lundon kaj la tagojn sekvantajn feriojn ĉesis. La ĝenerala konduto de la laboristoj plibonigis. Tiu ĉi plibonigo de la speciala notebla ĉe junuloj.

En la meblo-industrio drinkemo kaj praktiko foresti el laboro lundon preskaŭ komplete malaperis. La disciplino plibonigis rezulte de la okhora labortago.

En la presindustrio la praktiko foresti el laboro lundon ne estas plu laŭuza, kaj iuj kulfimoj, kiel eliri por trinki je la 4-a, vetludi por drinkaĵoj en la laborejo, ktp., estas malaperantaj. La disciplino fariĝis pli severa, deponi la enkonduko de la nova regularo por certigi, ke horoj de ĉeesto estu tute dediĉataj al la laboro.

La artikolo ankaŭ diras, ke similaj kondiĉoj troviĝas en transportaj kaj meblotransportaj entreprenoj, ĉe veturigistoj, ktp. Oni ankaŭ donas komparajn statistikojn pri la konsumado de alkoholo en Francujo.

Informservo de la Int. Lab. Oficejo.

Nota. Bonvolu sendi al la Bureau International du Travail, Genève, ekzemplerojn de gazetoj, presantaj tiun ĉi komunikon.

### RO ŜO in Memoriam.

De s-o Bredall, Croydon, Anglujo, ni ricevis sekvantan leteron:

Estimata redaktoro,

Vi jam sciigis per mia telegramo al la Nürnberga Kongreso, ke la maljuna eminenta Esperantisto Richard Sharpe (RO ŜO) mortis lastan merkredon, la 1. aŭgusto, 3.30 p.m.

Richard Sharpe estis unu el la plej fervoraj laborantoj por nia movado. Tiuj, kiuj posedas lian libron „Travivaĵoj“ scias, ke li vojaĝadis multe en Eŭropo kaj en Suda kaj Norda Ameriko. Li partoprenis ĉiun Internacian Esp. Kongreson ĝis 1921, kaj mi havis la honoron kaj plezuron lin akompani al Hego kaj al Proha.

Dimanĉon la 9. aprilo 1922 li vizitis min ĉe Hotelo Bay View, Torquay, kie mi kun la edzino libertempis. Posttagmeze li subite sentis malfortan paralizan atakon. Mi akompanis lin en veturilo al lia loĝejo. Laŭ la decido de kuracisto post kelkaj tagoj li transloĝiĝis al kuracejo en Torquay, kaj poste al Gosport, kaj lastan Pentekoston oni alportis lin al la domo de lia nevo Sunny Benk, Coggeshall, Essex graflando, kie li mortis.

La malpermo estas granda perdo por Esperantistoj. Oni povas kompreni lian fervoran kaj sinceran por tragikado de la nova libro „La Vendreda Klubo“, en kiu estas menciita de la gramatikaj demandoj kiujn RO ŜO faris al D-ro Zamenhof.

La Esperanto-movado perdis gravan subtenanton kaj mi perdis sinceran amatan amikon.

Sincere via

J. Bredall.

### Psikotekniko kaj publika ekonomio.

De D-ro Hans Paul Roloff, Hamburg.

Frederiko la Granda skribas en letero al d'Alembert: „Se oni sciis en iu lando ĉiujn kapablojn, kiujn la naturo hazarde disdonis, kaj uzus ĉiun el ili laŭ ĝia individueco, tia lando baldaŭ estus la unua en Eŭropo.“

En ĉi tiuj vortoj jam cent jarojn antaŭ la naskiĝa horo de la scienca psikologio estas starigita la temo, kiu estas la multe variata bazo de la praktika psikologio. „Metu la ĝustan viron al la ĝusta loko“. Ĉi tiu signa vorto precizigas ja unu el la ĉeftaskoj de la moderna, industria psikotekniko.

Kio do estas kaj kion celas la moderna psikotekniko?

La diskutadoj de la lastaj kongresoj por eksperimenta psikologio evidentigis, ke ĝuste nun la psikologio staras ĉe decida ĉirkaŭpunkto de sia historio, antaŭ kolosa pilargiĝo de sia laborkampoj: Ĝis antaŭ tute proksima tempo la psikologio estis scienco tute malpraktika, ĝi sin dediĉis en siaj laboratorioj al aferoj, kiuj nur mal multe interrilatis kun la reala, multforma vivo ekstere. Hodiaŭ maturiĝas la unuaj fruktoj de ĉi tiu silenta, tute scienca laborado: la psikologio, formo de la psikotekniko la unuan fojon eliras la multvastan laboratorion, ĝi tiom evoluigis siajn metodojn kaj studilojn, ke ĝi povas riski flanke de la pli malnovaj natursciencoj kaj samrajte kun ili kunhelpi la formadon de niaj ekonomiaĵoj kaj socialaĵoj, ĝi faris la gravan paŝon de el la teorio al la praktiko.

La psikologio faras ĉi tiun paŝon ne el propra iniciato: El la praktiko de la publika ekonomio mem la problemoj kreskas subite en ĉi tiuj tagoj tiom rapide multobliga, ke la laborejoj de la scienca psikologio relative malmultaj eĉ ne minimume povas plenumi ĉiujn deziritajn postultajn de ili. La kaŭzo de ĉi tiu stranga apero estas la nuna mondekonomia krizo: la organismo de la universala ekonomio malsanegiĝis, ne tolerablaj malhelpiloj malfaciligas la naturan egaligon de universalaj produktado kaj konsumado. Se la unuopaj ekonomioj volas entute resti ekzistkapablaj, ili estas devigataj redukti je minimumo almenaŭ la internajn malfaciligojn de sia produktado, kiom tion permesas iliaj rimedoj, kaj ĉi tie estas la punkto, kie la laboro de la praktika psikologio devas ekkomenciĝi, kie ĝia helpo efektive fariĝas, nepre necesa. Certe la praktiko deponi longe lernis spareme uzi fortojn kaj materialon, sed unu faktoro ĝis nun preskaŭ tute estas esceptita: la homo, la vera iniciatanto de la tuta produktada procedo. La postulon nun ankaŭ ĉiun homon

enorganismigi ĉe tiu loko en la tutajo, kiu konvenas al liaj emo kaj kapablo, adapti la laborilojn, la tutan produktadon ne nur al la korpa, sed ankaŭ, kio estas multe pli grava, al la spirita konstitucio de la iniciatanto de la tuta produktado, ĉi tiun postulon efektive la praktiko per si mem neniam povis plenumi, ĉe tio ĝi devigis la helpon de la scienca psikologio. Ĉi tiu ekkono nuntempe ĝeneraligis ĉe la kondukantaro de la publika ekonomio, precipe en la metalindustrio, la „psikotekniko“ depost kelkaj jaroj komencis sian laboradon.

La laborkampoj de la psikotekniko hodiaŭ disfakigas en tri grandaj subregionoj: La plej grava, hodiaŭ precipe interesa, estas la tiel nomata taŭgeca psikologio. La praktika celo de ĝia laboro estas mallonge karakterizebla per la signa vorto: metu la ĝustan viron al la ĝusta loko. Ĝia tasko estas elabori metodojn permesantajn meti ĉiun unuopulon, ĉu spirite, ĉu permane laborantan, al tiu loko de la tutajo, kiu konvenas al li laŭ liaj kapabloj kaj emoj, en kiu li laŭ nia tuta psikofizika konstitucio povas fari maksimumon da laboro kaj atingi maksimumon da persona kontentigo. La laboro de la taŭgeca psikologio do estas farata same por la bonstato de la tuta popolo, kiel de la unuopulo, ideale kunigante ĝi servas la interesojn de la dungintoj kaj de la dungintoj. Tiel la grandentreprenoj de la industrioj metala, teksa kaj lignaj rapide sekvante unu la alian nuntempe instalas proprajn psikoteknikajn laboratoriojn, ĉar la konfidinda, psikologia elekto de altvaloraj faktoralistoj nature influas la kvanton kaj la kvaliton de la produktataĵoj favore; tiel jam la 16-a germana sindikata kongreso en Nürnberg kaj la lastjara internacia proletariunulara kunveno en Salzburg same plendis por la efektivigo, kiel eble plej ĝenerala, de psikologiaj taŭgecaj provoj, ekkonante, ke la unuopulo ĉiaman kontentigon kaj daŭran laboroĝojon povas akiri nur en tia profesio, kiu konvenas ne nur al liaj emoj, sed ankaŭ al liaj kapabloj.

Dua granda problemaro de la psikotekniko havas sian centron en tio, kion oni nomas raciigon de la laborprocedo. Ĉi tiu parto de la psikotekniko temas pri la konstato de laborformo plej laŭcela, plej ŝparanta tempon kaj forton plej alfarita al la psikologiaj kondiĉoj de la laboranto. Ankaŭ la ellaborado de la maŝinaj kaj ilaraj formoj plej konvenaj al la korpa kaj anima konstitucio de la laboranto, la tiel nomata psikotekniko de la objektoj, ĉi tie enfakigas, kiel ankaŭ la psikologie ĝuste formado de la perfektiga kaj lerniga procedoj.

Fine kiel tria granda taskaro de la psikotekniko, kie ĝuste lastatempe la scienca laboro forte komenciĝis, estas menciinda la psikologio de la propagando. Ĝi okupas sin pri la esplorado de la animaj leĝoj de la verboscenco de la reklamo por la vendado de la finfabrikaĵoj, kiu ja celas ekscitadon de la atentemo, intereso, aĉetemo de konsumantaro kiel eble plej granda kaj do estas problemo amas-psikologia.

Kio do estas la ĝisnuna rezultato de la praktika psikologio?

Oni povas resumi ĝin jene: La psikologio staras ĉe komenciĝo de vojo permesanta tute larĝajn novajn perspektivojn. Sed ĝi staras nur je la komenco. Ankaŭ ĉio estas fluanta, ankoraŭ estas farita nur malgranda parto de la kolosa laboro farota, ankoraŭ ĝiaj metodoj bezonas daŭran evoluon atingeban nur per plej intensa kunlaborado kun la viva praktiko. Kaj tamen estas surprize: jam nun ĝi estas kapabla fari al la publika ekonomio plej gravajn servojn, jam nun laŭ raportoj praktikulaj ĝi malhelpis en sennombraj kazoj senutilan malsparadon de multvalora, homa energio ĉe malĝustaj lokoj, jam nun ĝi ŝparigas milionojn da valoraj al tre malfortigitaj publikaj ekonomioj.

Trad. Dr. Dr. Francke, München.

# Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, flidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciligojn (per poŝtkarto aŭ aparia folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrat' aŭ privataj sciligoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, flidinde, legeble (precipe nomoj).

## Landoj. Argentino.

Buenos Aires. De kelka tempo la stato ĉe la ĉi-ticia grupo de A. E. A. ne plu estis kontentiga. S-o E. Vitiennes antaŭ nelonge sukcesis starigi la grupuvon sur novan bazon.

La sukceso jam vidiga. Estas kelkaj kursoj gvidataj de s-oj V. Albamonte, H. Iglesias, L. Peña k. a.

Plue komenciĝis 1000 korespondadaj kursoj kun Esperantistoj el ĉiuj regionoj de la respubliko.

## Japanujo.

Tokio. — Kurso en Imperia Asocio por Edukado estis daŭrigata en Maio sub la gvido de s-o K. Macuzaki kaj K. Ossaka — Novaj klasoj de la kurso aranĝata de s-o B. Akijama, direktoro de la Nippono Esperanto-Gakui, la komenciĝis en Centra Budaisita Asocio, Kanda. En la unua tago de 1<sup>a</sup> kurso, vespere, la 5<sup>a</sup> majo, oni aranĝis specialan lecionon por la kursanoj; parolis

- S-o B. Akijama: malferra saluto
- S-o C. Kaneda: pri Esp. movado.
- S-o K. Ossaka: La forto (en Esperanto), interpretita de s-o K. Macuzaki.
- S-o M. Murata: pri elparolado de Esp.
- S-o J. Kaŭahara.

Preskaŭ cent personoj sin enskribis al la kurso. Vespere la 16. majo, J. E. L. kaj Tokia Studenta Ligo donis specialan feston por beni la junajn samideanojn. Kiuj lastatempe sin gradigis ĉe Universitatoj kaj aliaj koleĝoj; partoprenis 20 p. Uzante la okazon oni invitis s-on Kobajaŝi, kiu per 30-jara pena laborado ellaboris sian sistemon de internacia skribo (fonetika signaro) kaj aŭskultis el lia lekcio. — Vespere la 17-an, Sekai Sico Kenkiuj kaj (Societo Studenta pri Tramondaj Spiritoj), kiu komencis eldoni serion da korespondaj kursoj da Esp., aranĝis en Asocio por Kristanaj Junuloj, Kanda vere grand-skalan propagandan kunvenon. La salonegan parteron vastan kun etajĝ balkonegoj, plenis ĝi ol du mil aŭskultantoj, kaj ilian atenton aliris la paroladoj de

- D-ro A. Oka: Estonico.
- S-ro T. Ueno: Esp. en komerc.
- S-ro Ossaka: La homarantismo, spirito karakteriza de 1<sup>a</sup> nova tempo (en Esperanto), interpretita de S-o S. Sindo.
- S-ro J. Kaŭahara: Esp. movado.

Solkantado de F-ino Bubnov kaj de S-o S. Segara, kun fortpi na akompano de S-ino Bubnov. F-ino Alexander: Bahaismo kaj Esp. (en Esp.) interpretita de S-o Aŭbaro.

## Polujo

Radom — Dank' al klopjoj de kand. med. s-o J. Rubinstein kaj s-ano Wl. Kijak la ĉi-tiaj librovendejoj ricevis Esp. lernolibrojn. La vendado estas vigla. La nombro de Esperantistoj kreskas. — La ĉi-tia ĉiutaga „Siovo“ favore (dank' al s-ano Kijak) skribas pri Esperanto. Lastaj artikoloj: pri Univ. Kongreso. Esp. Jugoslavio, pri Esp. kaj Itala Registaro laŭ ET 176. R.

## Tekniko.

### Elektra trenado fervoja en Italujo.

Jam de multaj jaroj antaŭ la mondmilito la italaj ŝtataj fervojoj inaŭguris elektran trenad-servon sur la linioj de Val Polcevera, kiuj interkomunikigas plej grandan havenon de Italujo, Genova, kaj la ebenon de 1<sup>a</sup> Po, Svislandon ktp. Tiuj linioj estas la plej gravaj de la regno por vagonarmovado: en la valo kvar duoblaj reloj supreniras ĝis la proksima montoĉeno de la Apeninoj. La deklivo estas kruta: la trenado vapora neperfekte taŭgis por la servado; elektra trenado ĉiam funkciis multe pli bone laŭ teknika kaj ekonomia vidpunkto.

Tial post la milito Italujo, kiu ne havas karbon kaj nur malmulte da petrolo, klopodis utiligi siajn hidraulikajn fortojn precipe por fervoja trenado, kaj elektrigis liniojn apud Torino ĝis Modane, internacia stacio apud franca-itala landlimo, ĝis la ekstremajo de la malnova linio apud Genova. Nuntempe de Modane al Genova oni veturas ekskluzive per elektra trenado.

La elektraj linioj funkcias laŭ la trifaza sistemo. Jen kelkaj detaloj pri la maŝinoj, liniaj konstruaĵoj ktp.

La malnova lokomotivo kaj la tendro estas anstataŭitaj per elektra lokomotoro, ia marŝanta kajuto, kies radoj estas pli malgrandaj kaj la eksterajo pli modesta: ĝi enhavas du motorojn je kampo rotacianta, kiuj turniĝadas per alterna fluo. La fluo estas, kiel jam rimarkigite, trifaza: mi memorigas, por la neteknikistoj, ke trifaza fluo estas produktata de simplaj alternatoroj (generatoroj por alterna fluo), kies ĉerpdratoj estas tiel kunmetitaj al la internaj volvaĵoj, ke en ĉiu el la tri dratoj elirantaj de la maŝino, oni ricevas alternan fluon je egala periodo kaj plej granda valoro, nur defazigitaj po unu triono da periodo. Ni havas do kvazaŭ tri elektrofluojn en tri distingaj dratoj, tute same kvazaŭ ni havus tri distingajn alternatorojn de perfekte egalaj konstruo kaj rapido. Notinda estas nur tio, ke ne estas bezonaj la tri revenaj dratoj; ĉar sufiĉas kunigi la tri ekstremajojn de la triobla linio, por havi en la lasta punkto fluan valoron ĉiam nulan.

En la ordinara utiligo de elektrofluo oni povas vidi la tri kuprodratojn aerirantajn sur la izoliloj. Ofte oni vidas kvar dratojn anstataŭ tri: la kvara estas nomata „neŭtra drato“, pri kies celo ne estas parolate ĉi tie. Sed en la itala sistemo de fervoja trenado unu fadeno — aŭ, kiel oni diras — unu fazo estas la reloj mem utiligitaj kiel kondukiloj: aere oni havas nur du dratojn, kiuj kuras paralele laŭ la relvojo super ĝia akso. Ila distanco unu de la alia estas proksimume okdek centimetroj.

De la aeraj kuprodratoj la fluo estas prenata de la lokomotoro per du duoblaj „arketoj“, t. e. kvar kontaktiloj glitantaj, po du por ĉiu fazo. La kaŭzo, por kio oni ĉerpas la fluon de ĉiu fazo ne per unu sed per du kontaktiloj, estas klara. Unue estas preskaŭ forigita ofta intertempo por la momentaj disigoj inter drato kaj kontaktilo; sed precipe la reŝanĝiloj kaj rekruciĝoj devigas al tio. Efektive, tiam ankaŭ la aeraj elektrolinioj devas kruciĝi: la du malsamaj fazoj venas ĝis kontakto, kaj ni scias, ke inter ili estas ĉiam malsama kvanto da potencialo, ĉar la momentaj valoroj de tiu ĉi — kiel tiuj de la fluo — ne povas esti egalaj per la neegalco de la fazoj. Oni do estas devigata (kaj tiu estas unu el la plej grandaj malkonvenajoj de la sistemo) interrompi la fluportantan draton kaj ĝin anstataŭi per vergoj izolataj. La longeco de ĉi tiuj vergoj estas iomete malpli granda ol la interspaco de la du kontaktiloj de la lokomotoro; tial la fluo neniam mankas al ĉi tiu.

La motoro je kampo rotacianta, kiel oni scias, konsistas, kiel aliaj elektraj motoroj, el du partoj, unu fiksa — kiu estas nomata statoro — kaj unu turniĝanta — la rotor. En la unua estas la volvaĵoj, kie fluas la elektrofluo ĉerpta de la reloj kaj de la fadenoj. Tiu fluado starigas iun nombro (kiu rezultas el la duonigita produkto de l'

nombro de la fazoj kaj el tiu de la magnetopoluso) da magnetaj defluoj, alternaj kiel la elektrofluoj deveniginta ilin. Laŭ la fame konata eltrovo de Galileo Ferraris ekzemple tri magnetdefluoj alternaj, orientitaj po 120 gradoj, defazigitaj po unu triono de periodo kaj cetero egalaj, defazigas unu magnetan kampon rotaciantan.

En la rotor estas aliaj volvaĵoj, kiuj (en la kazo de nur unu izolita motoro, kaj escepte la periodo de l' ekturniĝado) estas fermitaj en rekta flurondo. Tie la kampo rotacianta naskas indukciajn elektrofluojn, kaj pere de ili alian kampon, fiksan rilate al la rotor mem. La mekanikaj fortoj, kiuj naskiĝas inter la du kampoj, rotacianta kaj rotora, ebligas la movadon.

La rapido de la turniĝado estas iom malpli granda ol tiu de la kampo rotacianta. Oni nomas „glitado“ ĉi tiun malakceladon, kies graveco estas plej granda, ĉar ĝi mem kreas la rotoran kampon; kaj oni ĝin esprimas per procentoj.

La eblaj marŝrapidoj de la lokomotoro, aŭ almenaŭ de la pli simplaj tipoj de lokomotoroj, estas du. Je la unua (ne atentante la ekmarŝan periodon) la du motoroj estas kunigitaj „laŭ intersekvo“ (= serie), t. e. tiel, ke la fluo de la linio aliras nur al la statoro de la unua motoro: la rotor utiligas preskaŭ duonon de la deprenita energio kiel mekanikan formon de energio, kaj duan duonon, transdonas al la statoro de la dua motoro. La rotor de ĉi tiu lasta estas, post la ekturniĝa periodo, en rekta konekto. De tio devenas, ke la glito de la unua motoro estas iom pli granda ol 50% kaj tiu de la dua estas nur 5 ÷ 6%.

Je la dua kunigo de la motoroj, ili ambaŭ funkcias seninterdepende kaj estas sempre konektitaj kun la liniaj kondukiloj: unuvorte — ili estas kuplitaj „paralele“.

La kvanto da fluo, kiun entute la lokomotoro deprenas de la linio, estas do duobla; la rapideco atingata estas ankaŭ duobla, aŭ proksimume duobla.

Saĝoj en la tremanta forto laŭ dekliveco de la linio aŭ kvanto da kilogramdekmiloj trenataj, ne ŝanĝas senteble la rapidecon de la marŝo.

Aliaj elektraj motoroj estas ankaŭ taŭgaj por fervoja trenado kaj uzataj sur ŝiaj kaj neŝtataj linioj en Italujo, sed nekompareble laŭ pli malgranda kaj negrava servado. Tamen la seria motoro je senŝanĝa fluo, ekzemple, estas taŭgiga pro siaj fakaj indecoj por la celo priarolito. Sed pri ĝi ni povos paroli, alian fojon kaj ankaŭ pri kreado de elektra fluo per akvofaloj, kio povos interesi iujn legantojn de ET, ankaŭ neteknikistojn.

Rinaldo Oregno, La Spezia.

## Scienco.

### Fonografa Biblioteko.

En la kunveno de Germanaj orientalistoj, kiu okazis lastan aprilon en Berlino, la Prusa Ŝtata Biblioteko donis interesan klarigon pri la Fonografa Biblioteko. La partoprenintoj ekkonigis kun la unua ke ĝi nun sonobiblioteko en la mondo. La intenco de la sonobiblioteko estas kolekti la lingvojn de ĉiuj gentoj. Ĉia lingvo-specimeno estas konservata kvarope: unue: skribata en literoj de koncerna lingvo due: kiel transskribo en latinaj literoj, tri: germana traduko (sekvos eble angla traduko); kvara: fonografe je fonografa disko.

La dua fako de la sonobiblioteko estas la malo de aŭto-grafio-kolektaro, la voĉoj de famuloj estas konservataj ĉi tie fonografe, kaj certe oni povus nomi ĝin „aŭtofonokolektarejo“.

La partoprenintoj aŭdis eksperimentojn, kiu estas tre konvena al orientalistoj, i. a. paroladon de Rabindranath Tagore, kiun li faris dum sia restado en Berlino. Oni mandos mirigite al si mem kiel oni akiris la 287 lingvojn, kiujn posedas la sono-biblioteko. La konservisto, Profesor Doegen, rakontis, kiel en la jaro 1915 en la militkapitejoj sin trovis homoj el la kvar ventoregionoj de la mondo, kaj kie tiu scienca laboro komenciĝis. Komplementulo de diversaj lingvoj kaj dialektoj, ĉiuj aŭtoritatoj je ilia fako, faris la ricevaĵojn. Parto de tiu riĉa materialo ankoraŭ ne estas prilaborata. Por la scienculoj, kiuj kunvenis en la jarkunveno de orientuloj, Prof. Doegen preferis materialon interesan por ili. La reprezentado ĝis speciale vigla, kiam sur la skreno aperis la bildo de la viro, el kies buŝo oni poste aŭdis lian gepatran lingvon. Dum la aŭdado mem de la skreno la teksto kaj transskribo, dum la komprenebla ankaŭ la ricevaĵo, la germana traduko, tiel, ke komprenis ankaŭ tiuj, kiuj ne scias la fremdan lingvon. El la multo de konservaĵoj ni notas nur kelkajn, la plej gravajn: la preĝon (muezin) de Iartaro; adiaŭ-kento, kanta de ĥoro de soldatoj el Madagaskaro, belega besifable, kiun Sikhano (Himalajo) rakontis, deziranto al Medino, kiun hinda mahometano kantis en la hindustana lingvo. La lingvo de Evejo (Afriko), kies vortoj estas konstruitaj el la samaj sonoj kaj kiuj ricevas diversan signifon per la malsameco de altoneco. Poste la tambura-lingvo de alia negro-gento, kiu ankaŭ nur diferencas en aŭtoneco kaj tamen posedas ritmon. Oni aŭdis anaman, korean kaj elganajn kantojn kaj lingvajn provojn. Mi ne forgesas ĉi la recitaĵon, kiun hinda laŭlegis el la sanktaj libroj, la Rigvedo kaj Upaniŝado.

La fiksigoj estas faritaj je kupraj diskoj, kiuj povos resti en bona stato dum 10 000 jaroj por ke la malofa materialo estu konservata en ĝia plena graveco.

De kia grandeco signifo estas ĉi tiu kolektaro por la etnografia esplorado kaj lingvo-studo, por muzika scienco, fiziologio, naturscienco ktp, tion ni povas supoz, sed ne supernigardi.

B. Schoen.

## Arto.

### Intervjuo kun Mario Jeritza.

Inter la mondvojaĝantaj geaktoroj staras en la unua vico s-ino Mario Jeritza. Ŝi eliris el la opero de Wien, kiu artinstituto estas bone konata de ĉiu muzikamanto, ĉar ĝi estis ĉiam kaj estas eĉ nun, inter la malbonaj ekonomiaj cirkon-

stancoj, unuaranga kaj altnivela. Mario Jeritza estas ĝia vera infano, ŝi estas Wien'ano laŭ animo kaj ankaŭ laŭ sia arto, ĉar ĉi tiu elkreskiĝis el la fundo de la Wien'a kanikulturo. Ŝi estas unu el tiuj valoraĵoj, kiuj estas nun kvazaŭ troa lukso por la ruiniĝinta Eŭropo kaj kiujn la maljuna kontinento disdonacas al la cetera, pli juna kaj pli felika mondo, parte ĉar ĝi ne povas ĉirkaŭoni ilin per indaj briloj (kaj briantitoj) parte por ke ili montru la disfaltantan haoson, sed eĉ en ruino imponan kulturon de Eŭropo. Ŝi venas el Ameriko kaj iras eble al Japanujo, sed dum ŝia mondmigro ŝi tuŝas ankaŭ Eŭropon, por — eĉ se nur dum kelkaj horoj — aŭdiĝi sin kaj tiel renovigi la rememorojn pri ŝi.

Mi opinias, ke por nia legataro ne estos seninterese, se mi reproduktas la enhavon de la interparolo.

Kiam en la pordo de ŝia hotela akcept-ĉambro aperis ŝia gracia figuro, mi unue petis pardonon pro la ĝeno, sed mi diris: „Mi kuraĝis tion fari, ĉar mi estas certa, ke mi estas la unua Esperantista ĵurnalisto, kiu petas vin pri intervjuo.“

„Certe“, ŝi respondas rideante, „sed estas interese, ke mi post jaroj denove renkontas la nomon de Esperanto.“

„Ĉu vi jam renkontis ĝin?“ mi demandas kun miro.

„Ho jes. Kiel juna knabino, mi ankaŭ diligente lernis, sed oni fiam ridis je mi, kio forprenis mian amon kaj poste la multa laboro...“

„Kaj la brilaj sukcesoj?“

„A multo laboro“, ŝi daŭrigis ne priatentante, „tute forgesigis al mi Esperanto.“

„Jes“ mi diris, „Esperanto estas kvazaŭ infanmalsano, preskaŭ ĉiu trapasas ĝin, sed dank' al Dio multaj restas malsanaj ĝis la morto.“

„Nu, ŝi ridetiĝis, „mi resaniĝis. Sed“ ŝi daŭrigis foliumante en ET kaj Literatura Mondo, kiujn mi jam komence transdonis al ŝi, „kiel mi vidas, la afero tiel bele progresas, ke oni preskaŭ dezirus remalsaniĝi.“

„Ĉu vi neniam sentis la bezonon de tia internacia komuniko, vojaĝante tra tiel multe da landoj kaj kantante antaŭ tiel diverslingvaj aŭskultantaroj?“

„Certe, la lingvoj donas al mi multe da penoj, mi ja kantas angle, france, germane, itale, ĉi tiuj kune estas mia internacia lingvo, kaj eĉ per ili mi ne kantas ĉiam en la gepatra lingvo de la aŭskultanto.“

„Vi vidas“, ekparolis en la mi propagandisto, „ke tiujn multajn lingvojn anstataŭas iam la sola internacia lingvo Esperanto.“

„Ĉu ni ĝisvivos tion?“

„Certe!“

„Nu, qui vivra, verra“, ŝi diras en unu el siaj internaciaj lingvoj.

Mi adiaŭas. Irante tra la halo de la hotelo mi havis la agrablan senton, ke mi parolis kun vere interesa artisto individuo kaj — mi aktualigis mian gazeton.

Endre Hevesi.

**Internacia trafiko.**

**Aerveturado.**

Sir S Hoave, Ŝtata Sekretario por Aero (parlamentano Unuiĝista por Ĉiĉsea) respondante al Sir H. B. Itin (Unuiĝista por Acton) demandinta pri la utileco de la antaŭ ne longe okazinta Internacia Aervojakongreso, diris ke antaŭaj tiuj kongresoj fariĝis en Parizo, Ĉicago, Milano, Nancy. Tiu de Londono do daŭrigis la agadprinciplon de internacia amikeco en la tero kaj liveris utilan ŝancon diskutadi teknikajn traktatojn pri la scienco kaj praktikado de aervojaĝado. Li estas tre dank' al la membroj de la diversaj komitatoj respondantaj pri la aranĝoj. Ŝajnes kredinde, ke la proksimaj internaciaj aerkongresoj estos en Bruxelles laŭ invito de la registaro. Ch. G. St.-M.

**La Kompanio de la Kanala Tunelo.**

La Komitato por la Tunelo inter Britujo kaj Francujo revivigis kaj rearanĝigis: la agada komitato havas 15 membrojn, reprezentante diversajn partiojn. La opinioj de novaj membroj ankoraŭ ne estas jam konataj, sed estis 103 voĉoj en la antaŭa parlamenta kaj en la nuna kiuj aprobas la projekton. Depuĵitaro elektigis por peti la parlamenton por debato en la aŭtuna kunsidaro. Ch. G. St.-M.

**Korespondado kaj interŝanĝo.**

Antaŭ kelka tempo mi emetis en mian ET anoncon en kiu mi esprimis mian deziron, korespondi letere. Jam el la teksto oni povus konkludi, ke mi deziras seriozan korespondadon, ne interŝanĝon de ilustritaj kaj neilustritaj poŝtkartoj. Sed miaj esperoj, ke mi povos lerni el la korespondado kaj pligrandigi mian konon pri eksterlando, ĝis nun ne estas plenumitaj. Kelkaj knaboj ofte en tre maltrista Esperanto skribis al mi poŝtkartojn petante min, ke mi proponu al ili la temon, pri kiu ni volas korespondi; laste mi ricevis ankaŭ karton de samideano (malblanke); li skribas en tre flua Esperanto ke li ĝis nun nur partoprenis mallongan Esperanto-kurson, kompreneble ankaŭ ke li petas bildkarton de mia urbo. Jam mi ĝojis, ke mi trovis escepton, kaj venontan tagon tuj volos respondi, kiam la leterportisto alportis al mi du plujajn kartojn el la granda urbo kun laŭvorte sama teksto, eĉ inkluzive malgranda craro, kiu mi unue opinias skribieraro. Do ŝajne la insurinto aŭ la el la kursoro skribis unue la tekston, kiu estis tialga por respondi al ĉiuj anoncoj pri korespondado kaj interŝanĝo, kaj ĉiuj samideanoj kopiis ĝin. Oni respondos al mi — Ĉu oni ne povas malhelpi ion tian? Ebe oni povas aranĝi specialan fakon por korespondaj anoncoj, en kiu oni akceptas nur anoncojn de personoj, kiuj estas iom perfektaj Esperantistoj kaj kiuj deziras korespondi pro la enhavo, ne por lerni la lingvon, kaj alian, en kiu oni akceptas anoncojn de komencantoj, kiuj deziras korespondi unuavice por lerni Esperanton.

Tia aranĝo de diversaj fakoj ŝajnas al mi ne plenumbla. Ankaŭ tro da fakoj ne simpligas la aferon. Eble jam sufiĉas, ke oni petas la korespondumojn, ke ili — se ili

estas komencantoj — ne ĝenu per skribaĵoj la anoncintojn, pri kiuj ili povas supoz, ke ili deziras nur seriozan korespondon kun iom perfektaj Esperantistoj, kaj ke, — se ili serĉas korespondon por pliperfektiĝi — ili mendu anoncon enhavantan la rimarkon „por pliperfektiĝi“. Plue: Kiu ne a'donis tion rimarkon, ne respondu al kartoj de nurlernemuloj. Laste: La anoncintoj aldonu al siaj anoncoj almenaŭ proksimuman aĝon kaj profesion kaj temon, pri kiu oni deziras korespondi. Skribi „pri ĉiuj temoj“ eĉ „pri ĉiuj temoj“ ŝajnas al mi plej ofte iom arroganta. Aŭ, ĉu fakte ekzistas kelkaj Esperantistoj, kiuj scias korespondi pri ĉiuj temoj, do pri astronomico, agrikulturo, senfadena telegrafio, grafiko, kuraco de rubrukozo, esploro de plej altaj aerregionoj filatelio, nuntempaj valutaj malfaciletoj, religiaj problemoj kaj ŝtalproduktado, per elektra forto, Ĉi tion devas kompreni en „ĉiuj temoj“. C. A.

**Letero el Polujo.**

Bydgoszcz, julio 1923.

Pluvperiodo, la plej longa depost 1848, vizitis dum tiu ĉi jaro Eŭropon. Speciale la nord-orienteŭropaj statoj, inter ili Polujo, notis preskaŭ senescepte konstantan malvarman temperaturon ligitan kun multnombraj pluvofaloj. Tiel ekz. en junio oni memoras apenaŭ unu tagon, en kiu ne pluis. Por la kreskigo de la kampoj kaj ĝardenfruktoj, grenaro ktp. estas la pluvo same necesa kiel la suna varmo. Sed dum tiu ĉi jaro estas laŭ la ĝisnunaj dimensioj nepre tro multe de la ĉiela roso. Malĝoje do kamparanoj vizitis siajn kampojn kaj gratante sin malantaŭ la oreloj, pensis timoplene al la alproksimiĝanta grenarrikolto, por kiu antaŭa tutmaturigo pere de la suna varmo estas nepre necesa. Enspense ĉiu prezentis jam por la venonta misrikolto malsatofantomojn; kio pro la hodiaŭaj malbonaj financaj kaj ekonomiaj ŝtatoj estas des pli ebla. Fine en la unuaj tagoj de julio la potenco „Pluvius“ (=pluvdonanto, apudnomo por la latina Jupiter) ekkoleris pri sia plorama vizaĝo kaj transdonis la regadon al la gaja, sunrada Apollo (lat. sundio). Depost 14 tagoj apenaŭ nubeto montrigis sur la lazura firmamento. Senkompate sendas la suno siajn radiojn al la tero, volante tiel rekompenci sian ĝisnunan foreston. Veriĝis do la meteorologiaj antaŭdiraj pri juliaj belveturo kaj parta varmeĝo. Pligajigis la vizaĝoj de la infanoj ĝis la maljunuloj. Plej multe ĝojas la kamparanoj kaj kontente ekkomencis la grenarrikolton. La lasta nature iom suferis pro la malvarmo kaj la pluvo, sed jam nun estas certa, ke la rikolto prezentigis kiel mezbona. Precizigante la esperatan rikolon nombre: (5 = tre bone, 4 = bone, 3 = mezbone, 2 = sufiĉe, 1 = malbone), oni ricevas jenon: vintra tritiko 3, 6, somera tritiko 3, 4, v. sekalo 3, 6, s. sekalo 3, 2, v. hordeo 3, 2, aveno 3, 4, kanabo 3, 5, trifolio 3, 9, sukerrapoj 3, 1. Laŭ supraj nombroj oni esperas en tuta Polujo grenarrikoltoj jenajn kvantojn: de la tritiko 14 milion. da centfutoj, de la sekalo 55 1/2 milion. da centfutoj, de la hordeo 14 milion. da centf. kaj de la aveno 27 1/2 milion. da centf. La supra nature dependas ankoraŭ de la plua favora temperaturo, sed esperable la enrikolitaĵo kontenligos plene la enlandajn bezonojn kaj permesos laŭnecese komercan interŝanĝon de troaĵo kun la najbaraj ŝtatoj.

Pola Esperanto Servo, Bydgoszcz.

**Monumento al D-ro Zamenhof.**

Kion devas scii ĉiu interesiganto pri la monumento al nia Majstro.

Ĉar ET okupis la lokon de t. n. libera tribuno-precipe koncerne la Monumenton al Majstro — multaj samideanoj el ĉiuj flankoj de l' mondo konsideris sian devon eldiri siajn opiniojn. Kaj ilia sinteno, estas tute prava: la Majstro estis spirita patro de l' tuta Esperantujo kaj ĉiuj Esperantistoj estas liaj filoj, sekve ĉiuj havas rajton kaj eĉ devon partopreni en la starigo de monumento al D-ro L. Zamenhof.

Cu mi kiel membro de l' Loka Monumenta Komitato en Varsovio rajtas ankaŭ publike eldiri mian opinion? S ĉiase al mi, ke jes. Tio devas eĉ ebe e- il mia devo. Tio mi pli ke mi volas doni opinion, koncentran pri la generalen staton de la afero, pli la formajn, la teknikajn flankojn ol la „meritum“ de la afero.

Antaŭ ĉio, antaŭ ol iu el la tutmonda Esperantistaro decidigas pri eldiri sian opinion, li devas scii la kondiĉojn, sub kiuj la Monumento estas starigbla.

La Va soviaj uĝarato konsistita preskaŭ nur el artistoj, al kiuj kaj Esperanto kaj la hebreaj ritoj estas plene fremdaj decidis precipe, kiuj monumento e- tus plej belaj. Kiamaniere la tasko estus plenumbla — tiu ĉi demando ĉi ne interesis. Por ili eĉ tute la starigo de l' Monumento estis afero indifera: la ĉefan rolon ludis la konkur-o-m. Kaj kon-ekvence de siaj vidpunktoj ili elektis du projektojn.

La tutmonda Esperantistaro havis por elekti nur la du projektojn. Kaj diversaj estis la opinioj. Unuj trovas pli bela la unuan, aliaj — la duan.

La ambaŭ kategorioj de samideanoj tute ne scias, ke inter tiuj ĉi du projektoj ne la beleco decid- s, ke inter tiuj ĉi du projektoj ne ekzistas elekto, ĉar la dua tute ne povas esti starigata, ĉar laŭ la hebreaj ritoj (kaj la Monumento star- s ia sur la hebrea tombo — kiu eĉ ne en Polujo estas tute izolita de alireligitaj tomboj) homaj figuroj estas malpermesataj sur iu tombo. Kaj tion sci- u ĉiuj!

Por kio do perdi tempon energi- n, kaj paperon por mediti pri la dua projekto?

Unu fojon por ĉiam: ni ekgisu la duan projekton.

Restas por pridiskuti nur la unua projekto. La Varsovia Loka Komitato jam difinis sian sintenon koncerne ĉi. Ĉar mi tamen esprimis mian *voĉon separatum* mi opinias havi rajton publike diri mian opinion.

La konkurso, kiu kunvenigis 18 projektojn, bedaŭrinde nenion konkretan al ni prezentis. Estis projektoj estetikaj, logikaj, alegoriaj, regulaj, ideaj ktp. ktp. Sed projektoj parolantaj ne estis. Projektoj, kiuj doni esprimu

bedaŭrinde ne troviĝis. Kaj se ni tiel longe atendis kun la starigo de monumento al nia kara neforgesebla Majstro, do tion ni faris ne por ke oni fine malpaciencigita starigu ian kompromisen tomboŝtonon. Nia monumento devas esprimi. Esprimi, kion nia patro al ni donis. Esprimi, kio instigis lin doni al ni fian benitan donacon. Kaj fine — esprimi tion, kion ni al li ŝuldas kaj kiel ni volas pagi nian ŝuldon al li.

Bedaŭrinde el ĉiuj 18 ne unu kontenigas eĉ parte tiujn ĉi postulojn. Kaj la konkursojn ni devas fial konkursideri ne sukcesinta. Ni devas ĝin irakli kiel skizon, kiel studon por posedu ĉiun kompetencan en plua laboro tiu direkta. Kaj nia unua paŝo en ĉi plua laboro devas esti anonco pri tutmonda konkurso por projektoj por monumento al D-ro Z. Mi ne okupos ĉi tie lokon por indiki kiel tia konkurso estas teknike realigebla. Tio estas afero de la centra kaj loka komitatoj. Mi nur jetas la projekton al la tutmondo, kiu konsideru tion kaj rezonu.

Kompreneble la unua el la kondiĉoj estu informo pri la neebleko skupi homajn (nur!) figurojn.

Mi opinias, ke mia projekto estas la plei ĝusta solvo de la enigmo kiel fine aranĝi la aferon, ke la tutmondo partoprenu en ĝi.

Al la iombo de l' Majstro havas rajton ĉiu Esperantisto.

Edvardo Wiesenfeld (Edvardo Lonkopolski)

Noto: Atentu pri la sama temo la leteron sub Parolejo.

**Nacilingva gaztaro en Polujo kaj Esperanto.**

„Voĉo de l' gazetaro estas voĉo de l' popolo“ — tiel ni povus en pli malpli bona senco libere modernigi la antikvan proverbon latinan „Vox populi, vox Dei“ (Voĉo de l' popolo, voĉo de l' Dio). Tiun ĉi gravecon de l' gazetaro por Esperanto ni Esperantistoj funde konscias, kaj tial klarigas la multloke sur nia mizera terĝlobo kun preskaŭ abela diligento farata propagando e la nacilingva gazetaro. Ties fiksukceso estos, ke nia persisto „traboras la monton granitan.“ — La komencaj malamikeco kaj daŭra atakado de Esperanto flanke de la — speciale naciista — gazetaro en Polujo cedas al ple parte pasiva sinteno, volante per mordsilentigo malhelpi la pluan disvastigon de la „internacia veneno“ — kiel nomas Esperanton la Polujaj ĵurnalistoj naciistaj. Unu el ili — forgesante, ke li uzas la internacian gazetaron kaj la internacian telefonon kaj telegrafon — siatemp e ne hezitis diri: „Mi kontraŭbatalas ĉion, kio estas internacia; Esperanto estas internacia, tial mi kontraŭbatalas ĝin.“ El tio rezultiĝas iam la speco de la de ili verkataj kontraŭesp. artikoloj, kies naiva tono kaj mallerta esprimmaniero e serioza leganto alvokas nur kompatindan rideton. Baptante Esperanton kiel afero „framasona, socialista, bolŝevista, hebrea ktp.“, ili eligas timigan vokon: „Hannibal ad portas!“ (Hannibal antaŭ la pordoj), sed Esperanto ne atentis tiun voĉon en la dezerto kaj venas akiris unu gazeton post la alia por ĝi. Oni devas konstati, ke preskaŭ ĉiuj germanlingvaj gazetoj en Polujo estas por Esperanto. Dum la lasta tempo skribis pri Esperanto en urboj Białystok: Dziennik Białostocki, Bielsk; Volkssimme, Bydgoszcz: Dziennik Bydg., Gazeta Bydg., Robotnik Wielkopolski, Deutsche Rundschau k. Volkszeitung (la plej favora), Łódź: Neue L. Zeitung, Repubiika, Krakow: Głos Nauczycielski, Lublin: Ziemia kaj Głos Lubelski, Poznań: P. Neueste Nachrichten, Inowrocław: Dziennik Kujawski, Lwów: Gazeta Lwowska, Tczew: Deutsche Zeitung, Toruń: Słowo Pomorskie, Warszawa: Czyn; Rzeczpospolita, Robotnik, Myś Narodowa, Poczta. Nature ni menciis nur gazetojn, de kiuj oni al ni sendis ekz. kun Esperanto-artikolo; ĉar verŝajne ankoraŭ multaj aliaj skribis pri Esperanto, la Pollandaj s-anoj estas petataj bonvole sendi al ni ĉiun gazeton kun Esperanto-artikolo por statistikaj celoj.

Pola Esperanto Servo, Bydgoszcz. Diuga 1.

**Al Vizitontoj de Wien.**

Tre ofte venas petoj ĉu al la Delegitaro, ĉu al „Danubio“, ĉu al „Fratego“ aŭ iu alia grupo de Wien, por prizorgo de loĝejo kaj gvidado tra la urbo. Por ne kredigi la eksterlandajn samideanojn, ke malbona volo de Wien'anoj malhelpas la plenumon de tiaj petoj, ni klarigas jenon: La malhelpo estas kaŭzita de la malbonaj vivkondiĉoj, precipe en la loĝado kaj de la fakto, ke preskaŭ ĉiuj Wien'anoj Esp-istoj deoras la tutan tagon kaj tre malfacile povas liberigi sin. Vizitantoj de Wien do bonvolu noti, ke demandaj leteroj tiurilate tre malofte povas esti jese respondataj. Ili petu pro prizorgo de ĉambro en hotelo kaj alveninte sin turnu al UEA-delegitoj aŭ sekretariejoj de la Eldonejo „Nova Tempo“, de kiuj ili estos informataj pri la societaj kunvenoj, kie plej certe ili trovas informon kaj helpanton. En Wien ĉiutage estas kunveno de iu Esp. socio.

O. Zimmermann, prez. de Esp. Delegitaro de Wien.

**Al la alilandaj muzikistaj societoj!**

(Alvoko represinda en ĉiuj landoj).

De tempo al tempo ni ricevas viajn gazetojn sed multaj el ili estas presitaj en lingvoj, kiujn ni tute ne komprenas, sekve ni ne povas profiti la informojn kiujn ili enhavas. — Ni turnas nin al vi kun la peto, ke la paraĝrafojn, kiuj povas

esti interesaj por alilandaj muzikistoj vi presu ne en via nacia lingvo, sed en la lingvo internacia Esperanto. Poste ni tradukos ilin en nian lingvon, por ke niaj membroj povu profiti ilin. En nia gazeto ni tiel same presos en Esperanto informojn, kiuj povas esti interesaj por vi.

Se vi ne havas inter viaj ofiĉistoj kompetentan Esperantiston, vi povas uzi la servojn de la Universala Esperanta-Asocio, kiu havas delegitojn en viaj urboj kaj kies membroj rajtos ricevi tiajn servojn per tiuj delegitoj.

Akceptu plejbonan saluton de viaj Britaj kamaradoj.

Transdonita de S-o H. Delacroix, 74 Fauburg St. Denis. Paris 10. Alvoko elirita de: 'The Musicians' Journal', London.

Parolejo.

192. Nova epidemio.

En Esperantujon venis nova epidemio — fondi kaj pensadi novajn vortojn, ĉu necesajn aŭ ne. Ĉiu Esperanta verkisto kaj tradukanto uzadas en siaj verkoj novajn kaj nekonaĵajn al legantoj vortojn, mem elpensante aŭ transfarante ilin laŭ nacia maniero kaj kutimo. Ekzemple estigis nova vorto „vando“ (vidu ET 129); ĉu oni bezonas ĉi tiun vorton? Ja ekzistas la vorto „muro“ kaj kiu ne scias, je kia signifo ĝin uzi, aldonu la vortojn „ligna“ aŭ „masonita“ laŭ neceso, ktp. Tiamaniere la vorto „vando“ estas superflua.

Alie estas pri vortoj novaj, tute ne konataj al la Esperantistoj-legantoj. Ekzemple, mi mem legis jenajn vortojn: stumpli impete, langvore kaj multe da aliaj. Kion ili devas signifati? La vortaroj, kompreneble ne helpas kaj kuŝas ne uzate. Nia lingvo ja estas sufiĉe riĉa je diversaj esprimoj kaj ĉu oni bezonas novajn vortojn oftege sinonimaj al jam ekzistantaj? Efektive, se la lingvo estas vivanta, ĉi bezonas novajn vortojn, sed nur tiajn, kiajn apogis la Lingva Komitato kiel necesajn al uzado. Se iu verkisto deziras uzi „novajn vortojn“, li devas antaŭe sin turni al L. A. kaj poste ilin uzi. Tiamaniere nia Lingva Instituto fariĝis fia, kia ĝi devas esti: silarante je la posteno de la lingva pureco. Kun tempo la L. K. eble ekpovas eldoni tiel nomatajn novajn vortojn kun diversaj tradukoj kaj rimarkoj, kaj ni modestaj Esperantistoj ĝuos legante kaj komprenante ĉion. J. Drafter, Varsovio.

P. S. Ni ne forgesu, ke elpensante novajn vortojn, ni same ankaŭ plipezigas nian lingvon, farante ĝin pli malfacila por ellernado al homoj pli aŭ malpli kleraj, kiel ekzemple estas laboristoj.

193.

Rilatas al n-o 165.

Internaciigo de l' tempo.

Certe tre necese estas, ke la Esperantistaro de la tuta mondo uzas la saman sistemon por kompreni pli kaj pli akre kaj por la tagordoj, programoj ktp. ktp. La sola bona kaj logika sistemo estas la dudek kvarhora, komprenata de ĉiuj kaj jam efektive uzata en la plejparto de la civilizitaj eŭropaj landoj. Mi memoras, ke mi svisaj Esperantistoj jam uzis tiun sistemon antaŭ la oficiala konkordo. La tago konsistas el 24 horoj, do estas stulte, kalkuli ĝis 12 kaj poste rekomenca denove ĝis la 12-a. Ilo ne estas novaĵo. En la antikvaj tempoj jam oni uzis tiun ĉi sistemon. Nijaj samideanoj, kiuj trapasis Venezia kaj Padova dum la lasta konferenco por la „komuna komerca lingvo“,

rimarkis la grandajn horloĝojn kun grandaj cifereplatoj indikantaj la 24 horojn de la tago. Sed la granda malfacilaĵo tute ne konsistas en la nombrado de la horoj, la plej granda malfacilaĵo estas, ke multaj nordaj kaj slavaj semideanoj skribas aŭ diras antaŭstata: estas la 9.30 horo estas la 1/2 10h. Tiu sistemo estas tute ne komprenata de la latinidaj popoloj. Eraro estas ankaŭ en multaj gramatikaj instruaj l. e. la 1.9.15, la 9.30, la 9.45 ktp. Nur per iu sistemo ĉiuj Esperantistoj de la mondo povas tuj interkompreni. Mi memoras en Budapeŝto, ke sur la tagordo estis skribite: tagmanĝo je la 1. h. Neniu el la latinidaj Esperantistoj scias, je kio horo oni devas iri por tagmanĝo. Do, ke ĉiuj Esp. instruistoj ne plu instruu laŭ tiu maniero, sed laŭ la fervoja modelo, kiu estas la plej simpla kaj la plej klara.

Koncerne la kalendaron. Depost, ke Ruslando, Serbuj kaj la Baltaj Ŝtatoj enkondukis la gregorian kalendaron estas tute senutile krei apartan kalendaron. Mi legis en iu ĵurnalo, ke lastatempoj ankaŭ Grekujo adoptis la gregorian kalendaron. Do tuta Eŭropo kaj Ameriko uzas nun la gregorian kalendaron, kiu fariĝis preskaŭ internacia.

Mi estas ankaŭ kontraŭ la Spesimilo, ĉar la ora franko jam estas preskaŭ internacia. Rigardu Svislandon, Francion, Belgion, Luksemburgon kaj Italujon, Jugoslavion, Grekujon, Bulgarijon, Hispanujon, Rumanujon. Kvankam ĉi tiuj nomas ĝin lro, d, n, a, r, o, p, e, s, e, t, o, k, t, p., tamen la ora valoro estas la sama, do preskaŭ jam internacia sistemo. Mi opinias, ke se oni diras „franko“, jam devas esti komprenata la ora franko.

Grava problemo estas ankaŭ la interkomprenigo de la temperaturo. Ni havas tri ĉefajn termometrojn: Celsius, Réaumur kaj Fahrenheit. Mi trovas Celsius, ankaŭ nomata „centigrado“, la plej taŭga, ĉar ĝi estas dividata en 100 gradoj, do laŭ la decimala sistemo kaj ankaŭ la plej uzata en Centro-Eŭropo kaj Sud-Ameriko.

Ni bezonas nur bonan volon, poste ĉiuj internaciaj komplikaĵoj estas deciditaj. Mi atendas respondon de D-ro Topolansky.

Isella, Del. de UEA, Lugano.

194. (Pri la monumento.)

Ankaŭ mi deziras esprimi mian modes'an opinion pri la projekto por la monumento de la majstro. Absolute preferante la projekton premilitan per la unua premio, mi neniel povas kompreni, kial kelkaj povas paroli por la dua, ĉar ĝi laŭ mia opinio estas ja teda, malarta miksaĵo de nebulaj formoj kaj linioj; sen ereto la nobleco de l' Majstro vivo, dum kontraŭe la unua projekto estas efektive eleganta kaj samfoje, malgraŭ sia simpleco, eĉ impona — kaj neniel „banala“ — rektaj linioj ne estas banalaj eĉ nuntempe, aŭ kion pravas ekz. la konkurso de „Chicago Tribune“? Per siaj puraj linioj, simetriaj formoj kaj proporcio la unua projekto ravas, vekas en la animo de alproksimiĝanto tiun neesprimeblan silentan piecon, kiel ĉiu vere arta verko. La artisto, kiu ĝin faris, vere vidis en sia intuicio la grandan animon de Zamenhof kaj kapablis ĝin esprimi, dum la farinto de la dua projekto penis esprimi ĉion, sed kapablis nenion. Eĉ la nomo de nia Majstro eĉ li estas neĝusia!

La monumento de la unua premio ni levu sur la tombon de nia Majstro; eĉ pura, blanka marmoro ni ĝin levu, kaj ĝi de vigoro ĉiuj alvenantoj, kiu silentaj ravo kaj malĝoj en koro, senpenigis sian kapon. — La teksto en la monumento estu Esperanta!

Se eĉ ĉio ne plaĉas, ni publikigu konkurson internacian! Sed almenaŭ en nenia kazo ni aprobu la projekton due premilitan, ĉar ion pli nekonsentitan oni ne povas imagi

Joh. Edv. Ruotsalainen, Käsäsimi, Finlando.

Anoncetoj.

ESPERANTO-RONDO en Turn (Ĉeĥos) aranĝos lertesperon je la 4. sept. Oni petas samideanojn (escepte el Ĉeĥos kaj Germ.) interŝanĝe sendi let. il. pk. kaj pm. al s-o Karl Jühn, Lindenstr. 10-21 en Tepitz-Schönaŭ (Ĉeĥos). [1]

EN SEPTEMBRO 1923 aperos Michel, Eŭropa, Katalogo 1924. Prezo: 2 guld., 4 sv. fk., 5 sv. kr., 4 norv. aŭ dan. kr., 0.80 dol., 12 lire, 20 c. kr., 20 fmk., 2 jen 5 šil., 10 fr. aŭ belg. fk., 5 hsp. pes. + 25% sendkostoj. — Komercservo Böning, Libanonstr. 45. Stuttgart (Germanl.) [1]

LETREVERPERON aranĝos la 12. aŭg. 1923 „Esperanto-sekcio“ en Klostergrab (Nordbohem. Ĉeĥoslovakio). Samideanoj ĉiulandoj estas petataj sendi poŝtfoliojn al s-o Anton Hetzel, en Klostergrab, Nordstr. 99. [1]

FILATELISTO! Kiu sendas al mi 100—1000 poŝtmarkojn sialandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo aŭ Iveri 1923. Gabriel Alomar, Prez. de EKP, str. Vallor, 4 en Palma de Mallorca (Hisp.) [3]

BONKORAJ KURACISTOJ. Mi malsaniĝis antaŭ 4 jaroj je spinurkurbigo, sed ĝis nun mi ankoraŭ ne resaniĝis. Laŭ konsilo de la fiaj kuracistoj mi portis ĝiskorseidon dum 4 monatoj, sed sen rezulto. Ĉar laŭ lia opinio la kurbigo estas tre malsupre. Se iu el vi scias certan kuracilon aŭ bonajn konsilojn, mi petegas viajn helpon al mi. Aleksandr Parov, str. Miladinova 21, en Rusĉuk (Bulgario). [1]

MILITINVALIDO petas bonkorajn samideanojn subteni lin per monhelpo, por fondi malgrandan vendejon. Bonvolu skribi al Esperantista Rondeto en Aschach aŭ Donau (Aŭstrio). [2]

KIU VOLAS HELPI aranĝi ekspoziciojn, por propagando de Esperanto en Supra Silezio, bonvol sendi il. pk. kaj Esperantistojn al s-o A. Jezirowski en C. machau, Oberschlesien (Germ.). [1]

DU JUNA laboremal amikoj (unu estas selisto kaj preferas sian profesion) serĉas postenon kiel servistoj aŭ laboristoj en sama loko. H. Wakonigg, en Köflich 288 (Siriio Aŭstr.). [1]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Poŝtmark-vendejo Heribert Rosenlecher, Zeilshemerweg 18, en Höchst a/M. (Germ.) dissendas belajn poŝtm. germ. (uzitajn kaj neuzitajn) kontraŭ sendo de minimume 1.50 sv. fk. Postulu la deziratajn markojn laŭ katalogo Michel. [1]

S-o J. E. Ruotsalainen, Leppäkoski, en Käksälmi (Finl.) deziras korespondi pri poŝtkaj literaturo kun gejunuloj poŝtalfate; deziras ankaŭ il. pk. pri insuloj kaj bordoj de Mediteraneo. [1]

Mi sendos por ĉ. kr. serion de Ruhr-Rheinpoŝtmarkoj kaj de flugpoŝtmarkoj (14 pecoj). Interŝanĝo pm. Welser Amort en Falkenhorst, Grünau b. Berlin (Germ.). [1]

S-o Br. Rejšič, Kr. Petra 44, en Zemun (Jugosl.) deziras seriozan interŝanĝon de pm. laŭ katalogo Michel. [1]

S-o Paul Müller, en Turn-Tepitz, Ritterstr. 544 (Ĉeĥosl.) deziras korespondon kun ĉiulandaj samideanoj per il. pk. (bfl.) kaj let., ankaŭ interŝanĝas pm. kaj gazetojn. [1]

S-o Ernfrid Malmgren, studento, Högalidsgratan Ho A, en Stockholm (Sved.) deziras korespondi kun kunuloj kaj aliaj Esperantistoj. [1]

Stefan Viehauser, en Wien IX, Tendlerg. 3/28 (Aŭstrio) deziras korespondi kun landanoj el ĉiuj landoj de la mondo per il. pk. aŭ let. [1]

S-o St. Malek (L2-jara) instruisto-seminariano, Steiernicka 5, en Gdz (Pol.) deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. kun ĉiuj landoj. [1]

Filatelio! Tre sperta filatelisto serĉas seriozajn amikojn en ĉiuj eŭropaj landoj, kiuj prizorgas pm. kontraŭ konstanta pago. Feldsamm, Unt. Mühlstr. 54 en Neustadt-Oberschl. (Germ.). [1]

S-o Josefa Caixach, str. Montseny 51, en Sabadell, (Hispanl.) deziras korespondi kun samideanoj el la tuta mondo per il. pk. kaj let. [1]

S-o Dr. Stanislav Holas, ingiŝto, Auenská 10, en Brno (Ĉeĥosl.) deziras interŝanĝi il. pk. kaj pm. kun ĉiuj landoj. [1]

Mi deziras korespondi kun tuta mondo per il. pk., ankaŭ interŝanĝas pm. kaj papermonon. Stanislav Dzus, Sterozagnanska 55, m. I en Kielce (Pol.). [1]

N. N. Filatov, Komunisticĉakaja 6, Novonikolevsk, (Sib. Rusl.) deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. [1]

Dana farmisto deziras interŝanĝi il. pk. Adr.: s-o Tullesen eĉ s-o Prebensen Altrup, Traustrup, (Danujo). [1]

T. Amon, Düsseldorf, Mühlheimerstr. 1 (Germ.) deziras korespondadon kun Paris'aj samideanoj, kiuj vizitas ĉevalkuradon. [1]

Josef Paffenholz, en Düsseldorf 106, (Germ.) deziras korespondadon kun eksterlandaj samideanoj kiuj vizitas la XV-an, por eble tiea interkonatoj. [1]

Fraŭlo Tiberio Haydn, Banská Bystrica, Lazovná 88, (Tatra, Ĉeĥosl.) deziras korespondi per il. pk. [1]

Sperta lingvistoj-instruistoj, s-o Madsen, Grenaa (Danujo) interŝanĝas je E. Instruistoj kaj infanoj montru al li kiel disvastigita estas nia kara lingvo. [1]

Juozas Binkevičius, en Utena, Ŭzupės gatvė 5 (Litovujo), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon kun ĉiuj landoj. [1]

Instruistoj! Mi deziras korespondi pri kristanismo kaj teozofio. K. Lind, Staatskrankenanstalt en Langenhorn, M10 b. Hamburg, (Germ.). [1]

Mi deziras korespondon kun seriozaj kaj idealaj fraŭlinoj, inter 18—20 jaroj, de la tuta mondo, per let. kaj il. pk. pri interesaj kaj sciencaj temoj, Esperante aŭ angle. Robert Pandikow, Peilbood 111, Wilhelmshaven (Germ.). [4]

Kiu sendos al mi 50—100 pm. sialandajn ricevos saman kvanton de mia lando. Mi ankaŭ korespondas per il. pk. kaj let. kun ĉiulandaj samideanoj. Rich. Fischer, Schillerstr. 5 en Wittenberg, Bez. Pdm. (Germ.). [1]

Juna dentoteknikistino deziras korespondi pri dentotekniko kaj pri diversaj temoj kun kuracistoj aŭ inteligentuloj el la tutmondo. Margarete Armuth en Kaposvár, Koronatuca 14, (Hungarlando). [1]

Mi deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. el ĉiuj landoj. Mi povas doni ĉeĥajn, rusajn kaj polajn pm. Isai Czerny en Warszawa (Polujo) Ogrodna 25. [1]

S-o Stefan Vardev, en Perić (Bulg.) deziras korespondi pri diversaj temoj kun tutmondaj gejunuloj, prefere kun progresintoj en la lingvo. [1]

S-o Ludoviko Heimlich, en Kaposvár Kontrassy u. 9 (Hungar.) deziras korespondi kun ĉiulandanoj precipe ekster-eŭropanoj, ankaŭ interŝanĝas pm. po 50—100. [1]

„IDDOJ DE ORFEO“ INTERESA ORIGINALA ROMANO DE H. J. BULTHUIS, L. K. Rekomendita de Esp. Lit. Asocio. — 842 paĝoj. 12 1/2 x 18 cm. Prezo: 2.35 guld. plus 0.50 guld. sendkostoj. Mendintoj ricevos la verkon post kiam ili sendis la monon. Libristoj havas rabaton! „Idoj de Orfeo“ estas libro por ĉiuj Esperantistoj, precipe ankaŭ por la junularo, skoloj ktp. ! Mendu ĉe la entreprenanto: La Anonima Societo, Centra Esperanto-Libroj en Den Haag 2 (Direktoro: F. C. Koens), Bankastraat n-o 2-a.

Pruvoj instruas plej bone!

ke vi aĉetas bonŝtoftajn pantalonojn ĉiuspecajn ktp. piej profite ĉe mi. Inter aliaj skribas s-o P. S. en Sheffield: „mi devas leŭdi vin por la bona formo kaj la bona maniero, kiel vi faris la pantalonon...“ Simile esprimas sin ankaŭ aliaj klientoj.

Tial provu ankaŭ vi!

Facile komprenebla mezur-sistemo. Malaltaj prezoj. Baldaŭa livero. Eksperto ĉiulanden. Malkaraj sendkostoj. Ankaŭ vendado de ne prilaboritaj ŝtofoj. — Postulu detalan oferton kontraŭ poŝtmarkoj aŭ stampil. resp. kup. de

Joh. P. Schmidt, Zittau i./Sa. 85 (Germanl.) Esperanto uzata!

Akra falĉilo estas la sveda falĉilo „Diamant“ kun garantiita akraĵo. Plejeblo bona fabriko kaj absolute plej bona kvalito. — Ni garantias! — Petu specimenon Karsnäs Lieverks A. B., Karsnäs (Svedujo).

Fumu La Esperanto-Cigaredojn „Tutmonda Esperanto“ „La verda stelo“. Cigaredomanufakturo Antehmo, Zittau (Saks.)

La numero de l' 19. aŭgusto aperos kiel 7-a kongresa numero kaj enhavos la lastajn raportojn pri la kongreso kaj la fakkunsidoj.

Po pakajo 100 hung. pm. diversajn el 1910—20 mi senda en granda kvanto laŭ interkonsentota prezo. Pli malgrandan kvanton en egalvaloro de hung. kr. 1100.— en la ajn mono. Mi respondas nur por mono sendita en rekomendite leteroj aŭ per banko. Konto ĉe la Nacia Kreditinstituto A. S. (Nemzeti Hitelintézet r. t.) provinca filio, Budapest VIII, Rákóczi ut. 9. Korespondon en lingvoj esp., germ., eble franca. Hungara Poŝtmarko — Vendejo kaj — Interŝanĝilo, Esperantista Komercisto Zoltán Balázs, Tapaszéle (Hungar.). [1]

S-oj Franz Hecker, Gneisenaustr. 3 III kaj Richard Prause, Kirchstr. 2, ambaŭ en Waldenburg i. Schl. deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. pk., por perfektigi en Esperanto. [2]

S-o Stefan Mülleraus en Materborn b. Kleve (Rheinl. Germ.) Schulstr. 20 IV, deziras korespondi per il. pk. kun samideanoj de ĉiuj landoj. [1]

Sendu bonajn pm. al s-o Arne Meldgaard Nielsen, Lillegade, Grenaa (Danujo); mi respondos tuj per sama kvanto. [1]

S-o J. A. van Dorp, Kersstraat 22, en Utrecht (Nederl.) deziras korespondi kun 18-21 jaraj samideanoj el ĉiuj landoj per let. kaj il. pk. [1]

Filatelistoj! Kiu sendas al mi 50—100 pm. de sia lando ricevos samkvanton de Ĉeĥoslovakio. Richard Horatlik, Kumžak 148 (Ĉeĥoslov.). [1]

S-o Gian Edilio Brisson en Genova (9), Corso Buenos Aires 17/7 (italujo) deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun samideanoj ĉiulandaj per leteroj kaj poŝtmarkoj, same knabo Bruno Brisson, 14-jara kun samaĝuloj. [1]

Ni tri fraŭloj deziras korespondi per leteroj ktp. ktp. kun ĉiuj landoj. John Vainio, Eriki Nokelainen, Vainö Abde Kastrenink, 11, j. 32 en Helsinki (Finlando) [1]

S-o Conrad Crüer, poŝtinspektoro, eĉ supera poŝtdirektoro, en Köln (Germ.) deziras korespondi kun samideanoj el la tuta mondo per il. pk. (bfl.). [2]

Mi deziras interŝanĝi pm. kun seriozaj kolektistoj de ĉiuj landoj. Mi preferas l' landon, Svedujon, Norvegiujon kaj Danujon. Dan. ov. Giuseppe, via Casareggi 26—6, en Genova IX (Italujo). [1]

Kiu povas liveri poŝtmarkojn de Albanio, Belgio, Danujo, Estonio, Latvio kaj Litovio? Ne fantazijaj prezoj! F. E. Farwerck, en Hilversum (Nederland) Emmasstraat 88. [1]

S-o Reinhard Müller Berthelsdorferstr. 48, en Freiberg/Sa. (Germanujo) deziras interŝanĝi il. pk., let. pm. kaj papermonon kun ĉiuj landoj. [2]

Vasil Nikolov, 18-jara gimnaziano, en Gorna Ĝumajo (Bulg.) deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. pk. (bfl.) kaj let. ĉiuteme, precipe kun gejunantoj. [1]

Je mia anonco pri korespondon mi ricevis tiom da respondoj ke al mi ne estas eble, skribi al ĉiuj. Mi tial petas ilian pardonon. Gust. Johansson en Falun. [1]

S-o Otto Nitsche, Petersburgerstr. 46 en Berlin O. 54, sendas tuj 100 germ. pm. kontraŭ sama kvanto de alia lando. [1]

Poŝtmarkojn el orientaj landoj vi plej malzare aĉetas ĉe Eldonejo „Esperantista Voto“, en Jaslo (Pollando). Ni sendas pm.-elektajn kontraŭ bonaj referencoj aŭ mon depono. Interŝanĝas pogrande; fusosendatoj malekceptataj. [5]